

EKO 2023



Nia aganto pri
instruado kaj
progreso

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



EKO 2023 / 64. Novembro 12, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler. Tria kontrolanto dezirata.

Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 390 KB. Alkroĉaĵoj: ?? KB. Sume: KB ??.

Zamenhof-festoj en Eventa Servo

Ĉu jarfine vi organizos komunan manĝon aŭ alispecan eventon okaze de la naskiĝtago de L.L. Zamenhof? Ni invitas vin vaste komuniki pri via agado.

Eventa Servo de UEA ebligas krei eventan paĝon per kiu vi povas informi en interreto pri tio KIAM okazos KIO KIE. Rapide havi aliron al tiaj praktikaj informoj faciligas la vivon de multjaraj esperantistoj. Trovi ĉiujn informojn pri Esperanto-okazaĵoj en unu centra loko - <https://eventaservo.org> – tio allogas novulojn.

Pasintjare la teamo de Eventa Servo faris [kampanjon](#) pri Zamenhof-festoj tra la mondo. La tiama ligilo <https://zamenhof.eventaservo.org> daŭre funkcias kaj ankaŭ ĉi-jare donas superrigardon de kiam kie kune festos esperantistoj.

Por aldoni eventon al Eventa Servo, necesas registriĝi. Jen instrukcia filmeto kiel fari tion: mallonge.net/es1. Se restas dubo aŭ se vi spertas praktikan malfacilaĵon, ne hezitu sendi retmesaĝon al kontakto@eventaservo.org.



Laŭ gazetara komuniko de UEA.

ILEI vidigas nun ankaŭ la araban

Fine, post la lasta korektado de la surretigita araba teksto fare de nia ege pacienca programistino Cristina Bollini, pretas la paĝoj en la ses lingvoj de Unesko en la retejo de ILEI. Temas pri la angla, araba, ĉina, franca, hispana kaj rusa. Vi povas aliri ilin rekte el la ĉefpaĝo <http://www.ilei.info/>, kiel ni jam raportis en EKO.

Kunlaboris al starigado de la seslingva prezento multe da homoj, inter kiuj Max Garcia, Maruf Sultan, Wei NingNa, Lin Lisa, Elena Nadikova, Fernando Pita, Didier Janot, Renato Corsetti kaj pluraj ne-esperantistaj geamikoj. Pretis kontroli kaj kunordigis la laborojn mi mem. Pli longa klarigo pri iliaj kreado, baza koncepto kaj uzeblo leĝeblos en IPR.

Alessandra Madella

AMO 105 ekis kun ambicia tritaga programo

Hieraŭ estis malfermita la 105-a Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO), kun la temo de libroj en kaj pri Esperanto en publikaj bibliotekoj. La seminario okazas kadre de tritaga ĉiujara renkontiĝo memore al Lucija Borĉiĉ, kiu mem okupiĝis ege pri tradukado kaj libroj kaj bibliotekoj. La seminarion partoprenis el Burundo la UEA-estrano kun respondeco pri la AMO-programo, s-ro Jeremie Sabiyumva. Entute partoprenis virtuale dek naŭ personoj, el Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Ĉinio, Francio, Hispanio, Hungario, Italio, Japanio, Kroatio, Slovenio kaj Svislando. Klare, esperantistoj amas siajn bibliotekojn kaj laboregas protekti kaj riĉigi ilin. Pli plena raporto aperos post la fino de la seminario post-morgaŭ.

AMO-seminario fermos la AMO-jaron

Informoj pri la AMO-Seminario de UEA en Togolando. Ĝi fariĝos AMO 106 aŭ 107.

Temo kaj dato: 'Esperanto kaj Mono'; 21-24 decembro 2023

Loko: Instituto ZAMENHOF, Lomeo, Togolando.

Gvida teamo:

ATTAGLO Kokou Evienyeame: Prezidanto de UTE

GBEGLO Koffi: Adminstranto de ACE kaj kasisto de UTE

DOUMEGNON Koffi: Estro de la komitato de UTE

Subtemoj:

KASETO (Kajero de seminarioj en Togolando en 2021 kaj 2022)

Koro de Instituto ZAMENHOF

Afrikecigado de Afrika Agado

Kuracado perherba

Vizio - Misio – Valoroj

La fundamento de Esperanto.

Por la plena programo, bv. skribi mem al la organizantoj: esp.togo@gmail.com

Koncizigita el raportoj de Gbeglo Koffi

La senfina okazigo de kursoj devas porti progreson...

... sed kie ni trovu la pruvon de tio?

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Kurso por komencantoj

Gvidantonomo kaj aldoninto: Nedeljka Ložajić

Loko: Beograd, Serbio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27597>

Enkonduko al Interlingvistiko

La Universitato Espoir en Baraka, DR Kongo, okazigas kurson pri enkonduko al Interlingvistiko. La kurso okazos rete ĉiun dimanĉon ekde la 7-a de januaro 2024 je 15:00 UTC por afrikaj kaj neafrikaj studentoj. Instruos Ahmad Mamduhi, la prezidanto de ILEI.

Enskribiĝu per mesaĝo al <UEC.Fakultato.pri.lingvoj@groups.io> kaj pagu 5 eŭrojn al la konto retk-v, ĉe UEA por enskribiĝo, aŭ 15 eŭrojn, se vi deziras kursfinan diplomon de la universitato.

En Kongo DR okazas por la 3-a jaro instruado per Vacapo (*WhatsApp*), kadre de la universitato Espoir en Kongo, en Baraka. La nombro da gelernantoj kreskis, estas pli ol 200 homoj en tri vacapaj grupoj. Paralele al tiu kolektiva kaj loza memlernado okazas individua kaj formala kurso.

La studentoj registritaj en la Fakultato pri Lingvoj, Esperanto kaj Interlingvistiko atingis la nombron 87. Pro tio mi serĉas alian instruiston por instrui per Vacapo. Ni nun estas tri, sed ni ŝatus dividi la laboron kun kelkaj aliaj. Necesas iom lerni la metodon de tiu programo.

Necesas ankaŭ regi la uzon de tabelo en Guglo. (Mi instruas nur per telefono kaj uzadas la apon *Google Sheets*.) Ne estas horo por konektiĝo: kaj la studento kaj la instruisto respondadas al la mesaĝoj kiam ili estas disponeblaj. Ĉiu lernas individue, ĉiu laŭ sia propra ritmo, ĉiu la saman programon. Estas 100 lecionetoj, t.e. 10 serioj de 10 lecionoj kun fina skriba testo per Vacapo.

Aktuale, Espoir zorgas pri la studentoj de la unua grupo (lecionoj 1 ĝis 10 kaj testo 1). Gadoufia zorgas pri la lecionoj 11 ĝis 20 kaj la testo 2.

Mi proponas al vi zorgi pri la lecionoj 21 ĝis 30 kaj la testo 3. Aŭ eĉ pli, se vi volas. Aktuale estas 10 studentoj en la klaso pri la lecionoj 21 ĝis 30. Ili devus redoni 3 taskojn semajne (ĉiu lecioneto finiĝas per tradukenda frazo, ĝi estas la tasko.) Sed averaĝe ni ricevas po 2 lecionojn de ĉiu studento. Tio signifas por vi korekti 20 frazojn semajne kaj akurate enskribi la numerojn de la lecionoj en la tabelo. Sed fakte ne tiom facilas la laboro, ĉar ni ne donu la respondon, ni helpu la studenton ĝis la fina venko! Mi kunhavigos al vi mian kolekton de gramatikaj bildlecionetoj, en Google Drive. Ili helpas, krom viaj voĉmesaĝoj, por klarigi la gramatikon. Dankon pro via helpo!

Fransoazo (Françoise NOIREAU el Francujo)
+33 609 120 374; desirdapprendre@gmail.com

Ondo bezonas apogon

Jam dum 1400 sinsekvaj tagoj ekde la 1-a de januaro 2020 en la novaĵretejo "La Ondo de Esperanto" ĉiutage aperas almenaŭ unu nova teksto. Konatiĝu kun la baza statistiko de la retejo kaj pripensu, ĉu vi povas helpi al tiu unika informservo, kiun financas **neniu** asocio, aŭ fondaĵo: <https://sezonoj.ru/2023/11/ondo-118/>

Radio-amatoroj serĉas optimuman frekvencon

La Radio-Amatoro en usono fondis specialan interes-grupon (angle: SIG – praktike faka asocio) por radio-amatoroj. Ili okazigas konkurson por radio-amatoroj. La faka asocio ILERA organizis Zoom-kunvenon en la 11-a de novembro kun la jena tagordo:

1. La historio de la konkurso (iomete).
2. Kie trovi informon pri la konkurso.
3. La reguloj kaj la formato de la interŝanĝo.
4. Kiel radio-amatoroj, kiuj ne parolas Esperanton partoprenu?
5. Frekvencoj kaj Eĥolinko.
6. La ILERA-diplomo kaj kiel atengi ĝin?
7. La estonto de ILERA – Kion vi deziras, ke ILERA faru?
8. Tago kaj horo por kunveno je 14.266 MHz.



Por pli da informoj pri ILERA: <https://uea.org/fakoj/ILERA>

Fonto: Komunikilo de Szilvasi Laszlo, Hungario

Kiel subteni sanon pere de Eo-agado?

Renato Corsetti per la retgrupo 'Afriko' starigis konkretan proponon, konstrui malsanulejon en Burundo. Respondas Roland Schnell el Germanio."Kompleta malsanulejo kostas milionojn da eŭroj kaj kiel okazos la repago de la investoj? La malsanuloj ja ne havas monon por pagi kaj asekuro ne ekzistas en Afriko. Kio eblus eĉ por esperantistoj estus "malgranda solvo" por la urĝaj bezonoj kaj prizorgo de higieniaj kondiĉoj. En multaj regionoj mankas eĉ pura akvo kaj ne ekzistas necesejoj. Mi ĉiam proponis, kiam oni konstruas lernejon, indas apliki la plej evoluintajn metodojn de higieno (*Eco San*). Oni ricevas eĉ subvenciojn de la Mondaj organizoj (kiel UNICEF, WHO ktp).

Loka medicina stacio, kiu prezentas la bazan prizorgon, ne estas tiom multekosta kiel malsanulejo, kiu bezonas la teknikon por operacio (ege multekosta). Devas esti MODELA projekto, kiu ligas la vorton ESPERANTO kun aktivaĵoj, kiuj servas al la bonfarto de la loĝantaro kaj samtempe ne dependas de subvencioj. Post malmultaj jaroj la lokaj entreprenoj pretas pagi por la edukado pri higieno kaj sekureco. Malsanaj laboristoj kostas monon. Sanaj laboristoj laboras pli efike. En Eŭropaj landoj ekzistas komplikaj strukturoj por zorgi la la bonfarto de laboristoj kaj lernantoj. La lokaj strukturoj de esperantistoj, universitatoj, lernejoj) devas engaĝiĝi kaj kombini modelon de sana vivo kaj lingvo. En nia projekto pri biogaso en Malio ni rimarkis, ke la multaj lokaj lingvoj estas problemo en instruado. Sed oni devas informi la lokajn kamparanojn per iliaj diversaj lingvoj.

Roland Schnell, Germanio

Nova kurso por ĉinoj

La kursaro Tibor Sekelj de ILEI lanĉas novan kurson pri Esperanto en la ĉina por komencantoj. La senpaga kurso okazas per *Zoom*. Ĝi okazas ĉiuvendre je la 12:00 UTC. Por aliĝi, skribu al la instruistino Liru Chen, mayliru09@gmail.com.

Legu, flegu kaj regu

Tempo rapide pasas. Baldaŭ komenciĝos la 84-a, novembra Sumoo la 12-an de novembro dum 15 tagoj ĝis la 26-a. Mi atendas aliĝojn. Venis reago de Honore Sebuĥoro el Kongo DR, kiu skribis "Mi legos tiun libron: Esperanto por mi de 16 geesperantistoj portretitaj de Helga Plotner. Ĝi enhavas 16 paĝojn. Ĉiutage, mi legos unu paĝon."

Hori Jasuo, Japanio kaj Honore Sebuĥoro.

===== vortoj: 1425 =====

La kolekto de EKO por 2023: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php> (ĝis 60).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/> .:

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldona al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolitoj.